**FRANCE.**—At the examination of pupils of the city schools of Grenoble, held recently under the direction of the official inspector, M. Lajonchère, 91 candidates in Esperanto presented themselves. Of these, 17 girls and 15 boys were awarded special prizes.

The hairdressers of France and her colonies recently held their second national congress at Paris, and unanimously passed a resolution that, in view of the international relations of the organization, and for the sake of general professional education, the study of Esperanto be recommended, and the language adopted as the language of future congresses.

In places where public notices are

given in a number of languages in addition to the French, one now frequently sees Esperanto alongside of the national tongues. Similarly, in journals like "Atmos," the organ of the Society of Aeronautics and Aviation, whose contents are published in repetition in several languages. This is of course the preliminary stage of a process by which Esperanto will entirely supplant the other languages, whenever publication in a language beside the national one is required.

**SPAIN.**—The official organ of the Spanish government has announced that Esperanto may now be taught in all the schools. Thanks for this triumph are due chiefly to the efforts of Senor San Miolan and Captain Jozefo Porogordo.

**BULGARIA.**—Three hundred Roumanian esperantists recently went on an excursion to Rusĉuk, as a pleasure outing by steamboat. The submayor of the city formally welcomed these excursionists.

**SAMOS.**—The number of pupils who last year studied Esperanto in the schools of this principality was 1,043, in accordance with the edict of the local Parliament, signed by Prince Andreas Kopassis last winter. His Highness, who takes a personal interest in the progress of Es-

peranto, has by recent circular expressed a desire that all teachers on the island prepare themselves to take the examination for "Atesto pri Lernado." This will doubtless have a very gratifying effect, for the "desire" of the Prince is equivalent to a command.

PERSIA.—A resolution just introduced in the Persian Parliament by Hadji Mirza Yahya, deputy from Teheran, provides for the teaching of Esperanto in the schools of Persia.

The Persian-American Educational Society, with headquarters in Washington, D. C., recently received the news that several classes in Esperanto are about to organize in Persia. In the school of Tarbiat, at Teheran, a class for the study of the International Language is already established. In the cities of Tabriz and Urmial, Persia, there is considerable interest and enthusiasm, and the Persian-American Educational So-

ciety is providing them with the necessary text books. This is a very good beginning, and it is hoped that as Abdul Baha, the leader of the Bahai Revelation, has commanded his three million followers in Persia to study this language, many classes will be established in other cities before long.

ENGLAND.—At a recent meeting of London esperantists, at St. Bride's Institute, the Lord Mayor of London, Sir Vezey Strong, entered the meeting for a short time, wearing his formal robes of office, and spoke to the interested assembly concerning his recent visit to Austro-Hungary, where 17 languages and dialects are spoken, and the result is great difficulty and discord. In all his public and private speeches there, he said, he advised that Esperanto be adopted as the inter-tribal language. No doubt advice of this character, coming from so prominent a disinterested source, will receive especial attention.

## *Kroniko Nordamerika*

*(Ni petas la lokajn sekretariojn, distriktajn sekretariojn kaj ankaŭ konsilantojn, ke ili sendu al la redaktoroj plenajn raportojn pri la progreso de la Esperantista Movado en siaj urboj distriktoj kaj apartaĵoj, antaŭ la 20a de ĉiu monato.*

*Ni ankaŭ petas individuojn, ke ili sendu, antaŭ la 20a de ĉiu monato, sciigojn pri artikoloj en ĵurnaloj, paroladoj, intervjuoj, ekstarigo de klasoj kaj grupoj, kaj ĉio alia interesa. Ĉar la novaĵoj en "Kroniko Nordamerika" estas plej precizaj se la informo pri ĉio venas rekte el la koncernata loko, ni esperas ke la esperantistoj donos specialan atenton al ĉi tiu peto. Bonvole skribu komunikajojn por ĉi tiu fakto de AMERIKA ESPERANTISTO sur apartaj paperoj, ne en leteroj pri mendoj, abonoj, k. t. p.)*

MANCHESTER, N. H.—La Esperantistoj de New England havis oktobran kunvenon en ĉi tiu urbo, kiel gastoj de la "Manchester Institute." Sur la programo, bele presita en Esperanto, aperas la nomoj de D-ro D. O. S. Lowell, Albert L. Clough, George Winthrop Lee, Wm. H. Huse, N. H. Hastings, Jno. L. Stanyon, S-ino Alice L. Harmon, kaj aliaj. S-roj Burnham, Huse, Lee kaj Fessenden faris dek-minutajn paroladojn en la lingvo. En la afera kunsido oni elektis la sekvantajn oficistojn: Edward S. Payson, prezidanto; D-ro Dana W. Fellows, vicprezidanto de Maine; E. J. Burnham, vicprezidanto de New Hampshire; John L. Stanyon, vicprezidanto de Vermont; Geo. W. Lee, vicprezidanto de Massachusetts, Rhode Island

kaj Connecticut. D-ro C. H. Fessenden estis elektita koreponda sekretario-kasisto, kaj C. H. Swan, arhivisto.

La Manchester "Union" antaŭ nelonge presigis longan leteron skribitan de samideano en Barcelono al E. J. Burnham, prezidanto de la loka Pionira grupo.

MONTPELIER, VT.—En la "Evening Argus" aperis trikolona artikolo pri la Sepa Kongreso de Esperanto, verkita de S-ro John L. Stanyon, kiu ĉeestis la kongreso kiel reprezentanto da sia ŝtato.

AMHERST, MASS.—Kelkaj studentoj en la ĉi tiea universitato nun studas la internacian lingvon en klaso instruata de F-ino Julia M. Leach, kiu estis ano de la amerika karavano al "La Sepa."

BOSTON, MASS.—La pola ĵurnalo "Po-budka" en oktobro komencis propagandi

Esperanton. Jen estas kontentiga fakto, ĉar tiu ĵurnalo estas vaste legata de usonaj poloj.

"American Photography" enhavis antaŭ ne longe redaktoran artikolon favore pritraktantan la uzon de, "tia simpla kaj admirinda aldono al la lingvoj de la mondo, kia Esperanto sendube estas."

La "Emerson Piano Company" ankorau ricevas oftajn petojn por informo, pro sia Esperanta reklamado (vidu la reklamajn paĝojn de AMERIKA ESPERANTISTO). Eĉ el Rusujo la petoj venas.

La Bostona Societo anoncas la jenan programon por la venonta monato:

BOSTONA ESPERANTA SOCIETO.

209 Pierce Building, Copley Square  
Vidu "Esperanto" en Telefono Libro.

Dataro Por Decembro, 1911.  
(Vespere se ne alie notate)

Dec. 1an. *Bonveno al Komencantoj*  
(Vidu sub vendredoj).

*Lundojn.*

(Escepte da 25an, Kristnaskon.)

8 p. *Lernantaro* de la Novembraj komencintoj, instruata de Sro. W. B. James.

*Mardojn.*

6 p. *Vespermanĝo* (ĉiu alportu la propran) kaj neformala interparolado por la nespartaj.

7.45 p. *Novica klaso* (je la Publika Biblioteko) komencanta la 5an de Decembro. Sro H. W. Small.

8 p. *Agada kaj ĝenerala societa kunveno.*

9.15 p. *Akcepto al la komencantoj* post ilia vespera leciono.

*Merkredojn.*

10 mantene. *Lernantaro*, instruata de Fino. Alice K. Duff.

8 p. *Dec. 6an*, Lingva konsilantaro. Aŭskultantoj invitataj. (Sekvaj kunvenoj aranĝotaj).

Dec. 13 an, 20 an, 27an, speciale anoncataj.

*Ĵaŭdojn.*

8 p. *Interparolado* speciale por spertuloj, sed ĉiuj societanoj invitataj. Kondukota je la 7a de Sro. G. W. Lee; je la 14a de Sro. N. Ward; je la 21a de Sro. F. G. Harrison; je la 28a de Fno. E. J. Meriam. Versajne la diskutoj multe

koncernos la venontan kunvenon de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko (1912).

*Vendredojn.*

8 p. *Dec. 5an. Elmontra kaj akcepta societa kunveno por komencontaj.*

(*Rimarko:* Regule, dum la sezono, la unuan (nedimanĉan) tagon de ĉiu monato, komencontaj estos bonvenaj ĉe la ĉambro por elmontra leciono. Oni povos aranĝi sekvan studadon aŭ hejme aŭ ĉe la klubĉambro, unuope aŭ are, kaj tiu studado estos senpaga aŭ paga, laŭvole.)

8 p. Sekvaj vendredoj, neformalajn, ĉeestos, je la 8a, Fno. E. J. Meriam; je la 15a, Sro. J. M. P. Phillips; je la 22a, Sino. C. Tyler; je la 29a, Sro. A. A. Downs.

*Sabatojn. Dec. 2an.* Promeno, kun parolado pri la arboj vintre, sub la gvidado de Sro. G. W. Lee. Kunvenu je la Ĉambro ĉe 1:55 por eliri je la dua per tramo aŭ vagonaro al "Arnold Arboretum."

8 p. *Novica klaso*, komencanta Dec. 2an. Sino. C. Tyler.

STATEN ISLAND, N. Y.—Unu vesperon en oktobro, S-ro H. W. Fisher el Perth Amboy donis paroladon pri Esperanto en la "Huguenot Reformed Church." Pastro Snyder lin prezentis al la aŭdantoj, kiuj kunvenis el la tri urbetoj, Huguenot, Prince Bay kaj Rossville, Post la interesplena parolado, Pastro Wm. H. Bawden el Perth Amboy parolis pri la utiloj kaj praktikeco de la lingvo. La aŭdantaro montris grandan intereson, kaj oni esperas organizi klubon. La ĵurnalo "Staten Island Transcript," kiu presigis bonan raporton, volonte ricevos nomojn kaj adresojn de ĉiuj interesataj je tio.

ALBANY, N. Y.—La ĵurnalo "The Argus" antaŭ ne longe presigis longan artikolon pri Esperanto kaj ĝiaj utiloj, nomante ankaŭ diversajn lokajn esperantistojn, per kies kunlaborado ekzistas loka klubo por studado kaj praktiko de la lingvo.

PITTSBURG, PA.—La "Bulletin" de la universitato de Pittsburg nomas Esperanton en sia anonco pri lingvoj instruotaj. S-ro J. D. Hailman, post sia reveno de Antverpeno (kie li oficiale reprezentis la ŝtaton Pennsylvania), faris

paroladon ĉe la Y. M. C. A. pri la lingvo kaj ĝia sepa, tutmonda kongreso. Kurso estis organizita sub la direkto de John M. Clifford, Jr.

YORK, PA.—La "Educational Prospectus" de la Y. M. C. A. anoncas ke ĝia Esperanto klubo estas instruata, kiel antaŭe, de E. E. Brill. Ĝi petas ke ĉiuj, kiuj deziras studi la lingvon, sin prezentu tie.

PHILADELPHIA, PA.—D-ro Joseph H. Noble, vicprezidanto de la loka societo, antaŭ nelonge tradukis el "Internacia Medicino" (oficiala organo de la Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio), artikolon pri sia profesia laboro. La plej malnova kaj konservema dentkuracista ĵurnalo en Usono, "Dental Cosmos," publikigis la tradukaĵon sub la titolo: "A Dental Clinic and a Dentist for Schools, by Dr. C. Klein Ulm, Germany, director of the School Dental Clinic at Ulm. (Published in the Dresden Internacia Medicino, January, 1911.) Translated by Joseph H. Noble, D. D. S." Ĉe la lasta kunveno de la "Barĉo," kiu okazis antaŭ kelkaj semajnoj ĉe la Windsor Hotel, granda nombro de klubanoj ĉeestis. Inter kelkaj paroladoj estis unu de la prezidanto, S-ro Hetzel, kiu revuis la progreson de la movado en la urbo, kaj precipe atentigis la kunmangantojn al la sukceso kiun la Barĉo de la societo jam atingis, kaj al la eĉ pli granda sukceso efektivebla. Kelkaj personoj faris mallongajn paroladojn; kaj la "benon" al la ĉiumonata festeno kaj la ĉeestantoj donis la patriarko de la societo, S-ro Levene.

Preskaŭ samtempe finiĝis la kunvenoj de la "Rondo," socia grupo en Okcidenta Filadelfio, organizita por praktiki la lingvon per ludoj, k. t. p. La sukceso de ĉi tiu grupo dum ĝia unua jaro estas pli ol kontentiga,—surprizante eĉ la fondintojn. Unu el la okazoj kiujn aranĝis la socia komitato dum la somero estis pikniko ĉe Valley Forge. La ŝtato Pennsylvania starigis antaŭ kelkaj jaroj publikan parkon inter la montetoj de ĉi tiu bela, historia loko. Tien piedmarŝis, dek du mejlojn de la distanco, grupo el la Filadelfia societo. Oni vizitis la diversajn vidindaĵojn, ĝuis la pejzaĝon de kelkaj altaĵoj, kaj piknikis sur alta krutaĵo superrigardanta la riveron Schuylkill, par-

olante Esperanton preskaŭ la tutan tempon. Oni intencas havi ekskurson aliloken en la kamparo antaŭ ol la aŭtuno finiĝos.

La loka societo havas sian propran "organon." En la printempo starigis S-ro Knowlan, ĝia sekretario, la "Esperantan Stelon," malgrandan folion por reklami la societon, kaj informi ĝiajn membrojn pri la diversaj okazantaĵoj ĉe la Rondo, Barĉo, k. t. p. La abonkosto estas sepdek kvin centoj ĉiujare, kaj oni uzas ĝin tute por la propagando.

PERTH AMBOY, N. J.—Artikoloj en "Evening News" bone priskribas la Kongreson. Elĉerpajon el "Brazila Esperantisto" priskribantan la mirindan progreson de Suda Ameriko, leteron el Japanujo al esperantisto en Perth Amboy, k. t. p. ankaŭ estis presitaj de ĉi tiu progresema ĵurnalo.

ELIZABETH, N. J.—Pro la influo de S-ro Rolland B. Moore, unu el la redaktoroj de "Elizabeth Evening News," tiu ĵurnalo ĵus enhavis artikolon klarigantan, pri Esperanto, kaj urĝe konsilantan ke ĉiu leganto uzu sian influon pri la "Leĝoprojekto 220," kaj ankaŭ aniĝu al E. A. de N. A., kaj abonu AMERIKA ESPERANTISTO. Ĉar la ĉiutaga eldono de la "Times" estas 20,000 ekzempleroj, sendube la artikolo havos bonan efektan.

PRINCETON, N. J.—S-ro Wilder Haines el Cleveland, Ohio, nun estas studento ĉe Princeton Universitato. Espereble li havos tempon por propagandi Esperanton iomete.

WASHINGTON, D. C.—La Internacia klubo antaŭ nelonge starigis du klasojn por komencantoj, kiuj deziras fariĝi neefektivaj anoj de la klubo. Unu klaso ĉiumarde je 7.30 estas instruata de F-ino N. Kuhlman; la alian, ĉiumerkrede je 7.00, dum la horo antaŭ la klubkunvenoj, instruas S-ro N. Guimont. Ambaŭ klasoj kunvenas en la klubĉambro, ĉe 607 15a strato. La supralerneja klubo bone rekomencis kunveni, en oktobro, ŝanĝinte la kunvenan tagon al vendredo (anstataŭ ĵaŭdo). En elektado de oficistoj por la venonta jaro, oni reelektis S-ron C. E. Nickles prezidanto, Robert Bruce vicprezidanto, kaj F-ino Isabelle McCaffrey sekretariino. Pli poste oni decidis starigi specialan komitaton pri programoj.



RICHMOND, VA.—La tagjurnalo "Times Dispatch" publikigis je la 29a de oktobro pritrakton pri Esperanto sur sia redaktora paĝo. Ĉi tiun ni ŝuldas sendube al la influo de Admiralo H. Webster.

TRYON, N. C.—Kelkaj personoj ĉi tie nun studas Esperanton. D-ro Garrigues instruas unujn el ili.

CHARLESTON, S. C.—La unua Esperanta premia konkurso de la "Charleston Esperanto Group" sukcese finiĝis. La ekzamenpaperoj de D-ro H. J. Garrigues, Tryon, N. C., kaj de S-ro Henry Brimm, Clinton, S. C., havis meriton tiel egalan ke ni decidis dividi la premiojn inter la du sinjoroj, kaj tial sendis al ĉiu suprenomita ĉekon por dek dolaroj. La aliaj konkurintoj ĉiuj bone progresis dum la periodo de la konkurso, kaj havas por premio pli uzeblan komprenon de nia bela lingvo.

CLEVELAND, OHIO.—Gaja okazo por la Cleveland Esperanto Society estis la festeno kiu okazis la 28an de septembro ĉe la hotelo "Colonial." Je la oka vespere, en unu el la belaj mangoĉambroj de tiu luksa hotelo, sidigis dudeksep geanoj de la societo por fari honoron al la eksprezidanto, S-ro. Emil Karpowsky, kaj por solenigi la revenon de S-ro. H. S. Hall, nia delegito al la Sepa. Tre bedaŭrinde, je la lasta momento, io okazis kio malpermesis ke S-ro. Karpowsky ĉestu. Oni atendis ke li respondos al la tosto "La Cleveland Esperanto Society" kaj, esprimante nian bedaŭron pro lia foresto, la tostestro diris ke li intencis prezenti lin kiel la plej fervoran, la plej modestan kaj la plej bone amatan esperantiston en la urbo. La a plaŭdoj de la aŭdantoj pruvis la verecon de la lasta diro.

S-ro. Hall, ĵus reveninte el Antverpeno, faris respondon al tosto "Esperantujo." Dum tuta horo li rakontis pri sia vojaĝo kaj per plej flua esperanto nin transportis en la landon de Esperanto kaj vivigis antaŭ niaj okuloj la scenojn de la Sepa.

S-ro. Edwin M. Robinson, verkisto kaj humoristo, faris respondon al tosto "Esperanto kaj Filozofio." La temo aludas la fakton ke S-ro. Robinson gajnis jam famon kiel redaktoro de ĵurnala kolono sub la rubriko "La Filozofo de Sensencaĵo." Li parolis angle kaj tre amuzis nin. S-ino M. M. Foote afable ludis for-

tepianan solon. S-ro Lisle Terwilleger estis tostestro, kaj F-ino Bailey kaj S-ino Wood faris plimulton de la aranĝoj. La menukartoj, kiuj ankaŭ enhavis la programon, estis bele presitaj en Esperanto. Unu el la gravaj ĵurnaloj de la urbo donis raporton pri la festeno. Ĉiuj ĉeestintoj esperas ke la festeno fariĝos ĉiujara afero.

Ĉe la ĉiujara elekto, la jenaj oficistoj de la klubo estis elektataj: prezidanto, H. S. Hall; vicprezidanto, S-ino Lisle Terwilleger; kasisto, Oswald Coleman; sekretariino, F-ino Sybil Bailey (kies adreso estas 2242 East 80th st.).

Kelkaj novaj kursoj stariĝis ĉi tie, kaj la lokaj teozofoj komencis studi Esperanton, en grupo sub la instruado de S-ino W. Wood, kiu esperas vojaĝi al la Oka Kongreso en Krakovo.

La "Cleveland Plain Dealer" en du apartaj artikoloj antaŭ kelkaj semajnoj tre favore pritraktis la lingvon Esperanton.

CHICAGO, ILL.—La pola Esperanta societo estas forta organizajo kiu bonege propagandas la internacian lingvon. Antaŭ kelke da semajnoj ĝi aranĝis ĝardenan feston en la parko Polonia (Jefferson). Oni ĝuis muzikon, paroladojn kaj diversajn plezurojn. La festo estis reklamita per grandaj afiŝoj presitaj pole kaj esperante.

ROCKFORD, ILL.—Esperanta klubo "Progreso" estis fondata ĉi tie la 22an de oktobro. Ĝia prezidanto estas S-ro Herman Hallström, kaj S-ro Karl Fröding estas sekretario-kasisto. La klubo havas dek du membrojn, kiuj jam studis la lingvon dum pli ol tri monatoj, kaj interŝanĝis poŝtkartojn kun samideanoj en preskaŭ ĉiu lando de Eŭropo. La klubo kunvenas ĉiun mardon vespere je la sepa horo, ĉe la Esperanta Oficejo, 417 7a strato. Vizitantoj ĉiam estas bonvenaj.

OMAHA, NEB.—En unu el la plej bonaj bohemo-amerikaj gazetoj, la ĉiusemajna "Osveta Americka," kiu estas publikigita en Omaha, aperis je la 12a de julio du-kaj duonan kolonan artikolon pri Esperanto, "Mezinardni reč Esperanto," verkita de Rudolf Honomichl.

LEWISTON, IDAHO.—La "Lewiston Tribune" presigis artikolon tre favoran al Esperanto. Ĉiuj en tiu regiono, kiuj deziras pluaĵn informojn sin turnu al J.

Howard Howe, R. F. D., Lewiston, Idaho, al kies influo ni ŝuldas tiun artikolon.

PALO ALTO, CAL.—La Esperanta kurso anoncita en Leland Standford, Jr. Universitato komenciĝis pasintan monaton, tuj post la enregistrado de studentoj. P-ro A. L. Guèrard kondukas la kurson. Tial la bonega artikolo "English as an International Language" de P-ro Guèrard en la oktobra *Popular Science Monthly*, des pli interesos la legantojn de AMERIKA ESPERANTISTO, kiuj trovos en ĝi bonajn, klarajn argumentojn por Esperanto.

LAKEPORT, CAL.—La "Lake County Bee" publikigis la leteron de la bulgara samideano aperintan en la junia numero de AMERIKA ESPERANTISTO, kune kun angla traduko de D-ro W. H. Fearn.

SALT LAKE, UTAH.—En ĉi tiu urbo, la 13an de oktobro, dek kvin personoj organizis grupon, kiu kunvenos ĉiuvendrede. La instruanto estas S-ro A. A. Austin el Anglujo.

COLORADO SPRINGS, COLO.—La jara kunveno de la "Colorado Springs Esperanto Society" okazis la 7an, de oktobro, ĉe la hejmo de sekretario-kasistino Pearl B. McMillan. Jas. Stevenson legis Esperantan leteron de P-ro Loud, la distrikta sekretario, kiu estas nuntempe en Washington. Oni elektis la sekvantajn oficistojn por la venonta jaro: Prezidanto, Jas. W. Stevenson; vicprezidanto, Wm. H. Jonson; sekretario-kasisto, S-ino Agnes Derr; kontrolisto de kontoj, C. M. Balkam; historiisto, W. N. Birchby. Post la voĉdonado, la anoj aŭskultis kantadon de F-inoj Hazel Conway, Pearl McMillan, kaj S-roj Derr, Neiderhauser kaj Neal; kaj fortepianan solon de F-ino Jessie Wharton. La vespero finiĝis kun la manĝado de kremglaciaĵo kaj kuko.

PORTLAND, ORE.—Samideanoj el la nordorienta parto de Usono kunvenis ĉi tie la 19an ĝis la 20a de pasinta julio. Multaj esperantistoj ĉeestis, kaj ankaŭ multaj homoj, kiuj deziris lerni ion pri

la internacia lingvo. Oni faris organizon la "Esperanta Asocio de la Pacifika Nordoriento," kies prezidanto estas Juĝisto J. D. Flenner, el Boise, Idaho, kies vicprezidantoj estas S-ro Lehman Wendell, el Tacoma, Washington, Kolonelo J. C. Cooper, el McMinnville, Oregon, kaj S-ro Bert P. Mill, el Idaho Falls, Idaho. La sekretario-kasisto estas S-ro R. D. Merchant, unu el la plej fervoraj kaj laboremaj esperantistoj en Portland. La anoj de la aga komitato estas S-roj H. Denlinger, S-ino E. H. Loomis, el Portland, kaj S-ro T. A. Leahy, el Astoria. La asocio urĝe konsilas ke ĝ'aj membroj aniĝu al la ESPERANTISTA ASOCIO DE NORDA AMERIKA, kaj abonu esperantistan gazeton.

S-ro Chapman bonvenis la esperantistojn al Portland, en la nomo de la loka "Commercial Club." Dum la kunvenoj oni ĝuis paroladojn de S-ro W. A. Henry kaj aliaj, kaj diskutadojn pri diversaj temoj; muzikon de S-ro W. E. Wells, F-ino Olga Johnson, kaj S-ro J. Benton Lindsay; deklamojn de S-ino J. R. Tomlinson kaj F-ino Helen Mills; ekskurson, festenon, k. t. p. Post la festeno, la komedieto "Ĝis la Revido" estis bone ludata de F-inoj Nina Hart kaj Zena McQuaid, S-roj D. Utter, kaj R. D. Merchant. La lokaj tagjurnaloj donis longajn kaj kontentigajn raportojn pri la afero, bonege reklamante Esperanton.

GRAND'MERE CANADA.—S-ro Ellwood Wilson antaŭ nelonge publikigis artikolon en Esperanto en plej grava germana arbarista ĉiusemajna gazeto, "Silva." La artikolo estas en germana, sekvata de la jena redakta noto: "S-ro Ellwood Wilson tradukis la ĉi supran artikolon en Esperanton, kaj por ĝenerala intereso la jena traduko sekvas." S-ro Wilson esperas publikigi similajn esperantajn artikolojn en aliaj gravaj ĵurnaloj de sia profesio, kaj sendube sukcesos. Bonega ekzemplo al aliaj profesiistoj!

## KELKAJ VORTLUDOJ.

Kiu lando similas la doloron de vivanta angilo en varmega pato? Patagonio.

Kio sin trovas en intermontaj orminoj? Valoro.

Kial apogiĝilo similas profundan voĉ-

sonon? Car ĝi estas bastono.

Kato, kiu lerte kaptas musojn, similas al kia spico? Muskato.

Kial ero da ero similas centran parton de teatro? Car ĝi estas parterero.

H. W. FISHER.

# Official Communications

*Sub ĉi tiu rubriko la redaktoroj volonte presigos komunikadojn de ĉiu esperantista societo, kin havas inter nia legantaro sufiĉe da anoj aŭ kies speciala fako de laboro interesos niajn abonantojn.*

## The Esperanto Association of North America

Central Office : Washington, D. C.

### THE ASSOCIATION'S ROLE.

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA is the officially recognized federation of all Esperantists in United States and Canada. Although it takes advantage of AMERIKA ESPERANTISTO as an organ in which to publish its official reports and communications, the ASSOCIATION should not be confused with the AMERICAN ESPERANTIST COMPANY which owns the magazine. The latter is a business concern, publishing, importing and selling Esperanto magazines, books, etc. The ASSOCIATION is purely a federation of all desiring to be recorded as favoring the movement. It was organized for the purpose of propaganda, the uniting of the work of the various state and local organizations, the establishing of new local centers of interest, the holding of examinations in Esperanto and the granting of diplomas to those qualified. In districts where the number of Esperantists is sufficient, there are state or district branches of the ASSOCIATION, and there are now being planned SECTIONAL FEDERATIONS of those having some other common interest beside Esperanto, such as a Section of Physicians, a Young People's Section, etc. All communications for THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA should be addressed to THE ESPERANTO OFFICE, WASHINGTON, D. C., and all payments for memberships, examinations, etc., should be made payable to the order of the association. When sending orders to the AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, you may include matters for the ASSOCIATION, provided these are placed upon a separate sheet to prevent confusion.

### MEMBERSHIP.

Every person interested in the Esperanto Movement and desiring to help to the extent of recording his name and thereby adding to the prestige of the general movement, is cordially invited to become a member of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA. The fee for ACTIVE MEMBERSHIP is only fifty cents (*less than one cent a week*) for the fiscal year or part thereof. The fiscal year ends September 30, 1912.

### SUSTAINING MEMBERSHIP.

Since the active membership dues of fifty cents can not much more than pay for the stationery, postage, membership card and printed matter sent to the members of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA during the year, the expense of propaganda material, and postage thereof, sent to inquirers is largely provided by SUSTAINING MEMBERS, SPECIAL MEMBERS and CONTRIBUTORS. A SUSTAINING MEMBER pays a yearly membership fee of ten dollars, or a monthly fee of one dollar for each of the twelve months. The following have become SUSTAINING MEMBERS since the last report:—

Judge W. R. Daingerfield, Dr. Ella F. S. Stone, Dr. H. W. Yemans, Dr. Eugene Kerr, Miss Cora L. Butler, Miss D. C. Condron, Mr. A. De Groff.

### SPECIAL MEMBERSHIP.

At the last annual meeting of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA a constitutional provision was made for SPECIAL MEMBERS. These pay a membership fee of two dollars, in addition to the active fee of fifty cents;

\$2.50 in all. The following have joined as SPECIAL MEMBERS:—

Dr. H. J. Garrigues, Mr. Adolph Mayer, Mr. C. H. Briggs.

#### CONTRIBUTORS.

Contributions of any sum are most thankfully received for the "missionary work" of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA. The following contributions, received during past few months, have not heretofore been acknowledged:—

Ten dollars each, Mr. J. D. Hailman, Mrs. Flora Wyman; \$5.00, Mr. Wilder Haines; \$3.25, Mr. J. B. Wallace; \$2.00 each, Mr. A. A. Clarke, Mr. Odiorne Gleason, Mr. C. J. Roberts; \$1.00 each, Miss J. H. Beebe, Mr. A. G. Rauschelbach, Dr. Tobias Sigel, Miss M. K. Anacker; 50 cents each, Prof. H. H. Lane, Mr. O. B. Coleman, Miss A. E. Beatty, Miss H. B. Langille.

#### NOTICE.

##### REVISION OF CONSTITUTION.

At the annual meeting of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA in August last, the undersigned were appointed a committee to consider a revision of the constitution and recommend any changes deemed advisable, reporting same at the next annual meeting.

We shall be pleased to receive criticisms of the present articles and suggestions for their improvement from anyone interested. Proposed amendments may be sent to any member of the committee and will receive careful consideration. Prompt action is requested.

J. D. Hailman, chairman, 310 S. Lang Ave., Pittsburg, Pa.

Roger P. Heller, 18 West 104th Street, New York.

George Winthrop Lee, 147 Milk St., Boston, Mass.

#### FINANCIAL STATEMENT.

Since the first of October marked the beginning of the new fiscal year, the receipts and expenditures of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, from October first, 1910, to September thirtieth, 1911, are given in this number.

#### RECEIPTS.

Active Memberships.....	\$346.31
Sustaining Memberships .....	328.00
Contributions .....	78.20
Examinations .....	151.70
Heralds, slips, etc.....	133.22
Loan from E. C. Reed.....	65.00
Profits on magazine subscriptions	13.75
	<hr/>
	\$1,116.18

#### EXPENDITURES.

Postage .....	\$143.02
Examinations, diplomas .....	93.65
Printing .....	367.59
Office rent .....	100.00
Stenographic assistants .....	229.75
Office supplies .....	37.10
Councilors .....	10.00
Secretary for October, 1910....	100.00
Balance on hand Sept. 30, 1911..	35.07
	<hr/>
	\$1,116.18

#### TREASURER'S ACCOUNT.

##### OCTOBER.

##### RECEIPTS.

Cash on hand October 1, 1911..	\$35.07
Membership fees .....	74.50
Sustaining Membership fees....	12.00
Examinations .....	9.85
Sale of "Heralds," etc.....	1.57
Contribution .....	.50
	<hr/>
	\$133.49

##### EXPENDITURES.

Postage .....	\$8.37
Examinations, diplomas .....	5.25
Printing accounts .....	87.50
Office assistant .....	9.00
Office rent .....	7.50
Balance on hand October 31....	15.87
	<hr/>
	\$133.49

#### ESPERANTO HERALD, No. 10.

The ESPERANTO HERALD is published monthly, except July and August, by THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA. This publication is a small pamphlet, admitted by the Post Office Department as second-class matter, and intended chiefly for propaganda. One copy each month is sent free to each

member of the ASSOCIATION, and extra copies for distribution may generally be obtained from the central office in lots of 25, 50 or 100, at the rate of one cent per copy. The October number contains the admirable address of Dr. Zamenhof at the Races Congress. Single copies of this or other editions of the *ESPERANTO HERALD* will be sent on receipt of two cent stamp.

EXAMINATIONS.

THE *ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA* conducts two examinations in Esperanto, in order that students may ascertain the grade of proficiency to which they have attained and have an official diploma to certify to such proficiency. The fee for registration for the *PRELIMINARY EXAMINATION* is ten cents, the examination and diploma fee to be sent with the returned papers is \$1.25. The fee for registration for the *ADVANCED EXAMINATION* is twenty-five cents, the examination and diploma fee \$2.50. Detailed information sent upon request.

PASSED *PRELIMINARY EXAMINATION*.

(*Atesto pri Lernado*).

Benj. E. Jones, Cleveland, O.  
Mrs. L. E. Fuller, So. Framingham,  
Mass.  
Alvah Mote, Woodland, Mich.

PASSED *ADVANCED EXAMINATION*.

(*Atesto pri Kapableco*).

H. B. Frost, Ithaca, N. Y.  
John M. Phillips, Milford, N. H.  
Armando Cabrera, St. Louis, Mo.  
Miss Eliza Emery, Mexico, N. Y.

DO NOT FORGET THIS.

Remember that you can put a little money in the treasury of THE *ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA*, without taking any out of your own pocket, by making use of our Subscription Agency. When you renew your subscriptions for "Everybody's," "Scribners," "Outlook," or any other magazine, or when you subscribe for one not before on your list, send your subscription through the Secretary-Treasurer of THE *ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH*

AMERICA. This will save time and money for you, since you will use but one check or money-order and one stamp, instead of several, and you will not have to look up the address of each publishing company. Nevertheless, the treasury of the ASSOCIATION will receive some profit, in the commission allowed it as a subscription agency. Please try to have your friends use this agency also, in addition to remembering it yourself. Simply send with your name and address the names of magazines desired, with check to cover cost of regular subscription price. If you subscribe for several magazines at once, special club prices can be given you, so that the magazines will cost you less than the regular rate.

DEATHS.

With profound regret for the loss sustained by THE *ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA*, the following items are recorded:—

Harold H. Hartwell, of Montpelier, Vermont, was found dead at his home, October 7th, death resulting from a hemorrhage. For nearly a year Mr. Hartwell was a most enthusiastic and active Esperantist, and has been the vice-president of the Washington County Esperanto Society since its organization. A few days before his death he told the writer that he would commence at once to plan to attend the Congress at Cracow next year. His devotion to an aged invalid mother for many years had precluded his taking part in affairs of social life, but his great love for reading in a great measure made up for such loss. He entered into the study of Esperanto somewhat reluctantly at first, but soon became an enthusiast and was one of the very few in our little band who could converse with pleasure to himself and profit to others. We shall greatly miss him; li ripozu en paco.

JNO. L. STANYAN.

Kol. Bradford mortis la 10an Aŭgusto pro pneŭmonio. Lia morto estis tute neatendita, ĉar ĉiam li ŝajnis ĝui pli ol ordinaran bonsanon, kaj precipe en lastaj tagoj sanis bone. Do lia subita morto frapis nin des pli peze kaj malĝojige.

Ni, Baltimore'aj Esperantistoj, perdis veran amikon, plej fidelan samideanon,

fervoran esperantiston, al kies memoro pro lia konstanta kaj efika helpo kaj subteno de nia afero ni estas kaj ĉiam estos kore dankemaj.

PAUL F. HOFFMAN,

*Prezidanto, Baltimore Esperantista Societo.*

Kun granda bedaŭro ni ekscias pri la morto de P-ro Siegfried Lederer, germana aŭtoro kaj sciencisto, kiu estis ankaŭ esperanta verkisto, kaj ĉefredaktoro de "Ĉirkaŭ la Mondo." De januaro, 1911, li estis kunlaboranto al AMERIKA ESPERANTISTO, kaj montris al nia gazeto grandan helpemecon.

Pro ĉiuj legantoj de AMERIKA ESPERANTISTO, ni esprimas al niaj samideanoj

en Germanujo kaj Aŭstrio plej sinceran simpatian pro ĉi tiu perdo, kiu estas granda perdo al la tuta esperantistaro.

LA REDAKCIO.

ESPERANTISTA EDZIĜO.

Ni deziras plenan felicon al Sro. H. S. Blaine, el Toledo, Ohio, kaj Fino. Mabel Andrews, el Chicago, Ohio, kiuj geedziĝis la 19an de julio, 1911. Ili loĝas ĉe 1104 Norwood Ave., Toledo, Ohio.

ESPERANTISTA NASKIĜO.

Plezure ni anoncas pri la naskiĝo de filino, Madeleine Christiane, la 4an de septembro, al Barono kaj Baronino de Menil en Parizo, Francujo.

## *Laborado Inter Kristanaj Esperantistoj*

KRISTANA KUNVENO DUM LA SEPA KONGRESO EN ANTVERPENO.

**G**RE grava kunveno de Kristanaj Esperantistoj okazis vendredon, la 25an de aŭgusto, en la Reĝa Ateneo. Partoprenis samcelanoj el sep diversaj landoj. Oni decidis baldaŭ fondi internacian organizaĵon inter kristanaj esperantistoj, kaj elektis komision de kvin membroj por starigo de la regularo. La membroj estas: Sroj. W. M. Page (Skotlando), Sro. H. A. Luyken (Anglujo), Sam. Meyer (Francujo), L. E. Catlin (Usono), P. Hübner (Germanujo). Oni volonte akceptos proponojn de aliaj samcelanoj. La laboroj de la komisio estos publikigataj en "Dia Regno." Ĉiu, kiu interesiĝas pri la afero, skribu al Paul Hübner, Delbrück bei Köln, Germanujo. Oni ankaŭ eldonos poŝtkartojn kun la fotografaĵo de la kristana kunveno en Antverpeno.

ESPERANTA KUNSIDO ĈE TUTMONDA KRISTANA CELADA KUNVENO.

La pasintan someron, pli ol dek mil delegitoj kunvenis en la fama usona somerurbo Atlantic City (ŝtato New Jersey), kaj de la sesa ĝis la dekdua de julio kunvenis ĉiutage en multaj kunsidoj. Inter la parolintoj estas Wm. H. Taft, la

prezidanto de Usono; Chas. Fairbanks, eksvicprezidanto de Usono; Champ Clark, estro de la usona "Domo de reprezentantoj;" Booker T. Washington, fama edukisto de nigruloj kaj ankoraŭ aliaj, kiuj havas nacian famon.

Tamen, la afero plej interesa al ĉiuj esperantistoj estis la kunsido pri Esperanto kaj Kristana Laboro, kiu okazis la dek-unuan de julio, en salono de la Atlantic City "Y. M. C. A." Pastro Anderson, helpa redaktoro de la "Christian Endeavor World" (Kristana Celada Mondo) prezidis, kaj faris la unuan paroladon, klarigante pri la teorio, karaktero, kaj uzado de Esperanto. Li ankaŭ montris la praktikecon de tiu lingvo por kristanaj aferoj. Post lia parolado, Sro. Lüders, el Filadelfio, legis la unuan Psalmion, kaj ankaŭ parolis, iom pli detale, pri iuj temoj jam priparolitaj de Pastro Anderson. Tiam Pastro Anderson prezentis Pastron G. H. Hubbard, misiiston el Hinujo, kiu rakontis al ni pri la malhelpo kiun li havis dum sia laborado en Hinujo, pro la diverseco de la multaj dialektoj. Li tre klare montris la grandan utilon de la internacia lingvo en tiu lando, kaj fervore konsilis ke oni lernu Esperanton.

La proksima parolanto estis Sro. R. C. Heller, el Nov-Jorko, kiu legis la

leĝoprojekton proponitan en la usona reprezentantaro,—ke la Komitato pri Instruado esploru kaj raportu pri la utileco kaj praktikeco de Esperanto en internaciaj aferoj de la registaro. Per voĉdono la ĉeestantoj esprimis aprobon, kaj petis ke Sro. Heller transdonu al la estroj de la “Domo de Reprezentantoj” ilian fortan deziron ke la projekto baldaŭ fariĝu leĝo. Fine, Pastro Catlin, el Blossburg, Pa., legis poŝtkarton de Sro. Paul Hübner, redaktoro de “Dia Regno,” kiu sendis el Germanujo sian koran saluton al la kunsido. Pro manko de tempo, la kunsido devis tuj finiĝi, tial oni ne povis fari organizon. Poste, en neformala kunsido, Pastro Catlin donis unuan lecionon en Esperanto al tiuj inter la ĉeestantoj, kiuj sciis nenion pri la lingvo. Dume, Pro. F. H. Loud, el Colorado Springs, Colo., estis aranĝinta ekspozicion de esperantaj libroj, k. t. p., en la Kristana Celada librotutiko, ĉe la “Boardwalk” (konata promenejo), kaj tie povis fari grandan propagandon. Multaj personoj interesiĝis, kaj decidis lerni la lingvon.

#### ŜTATA KUNVENO EN NEBRASKA.

La ŝtata kunveno de Kristanaj Cela-

distoj en Nebraska okazis en Lincoln, ĉefurbo de la ŝtato, la 25an ĝis la 29an de oktobro, kun ĉeestado de proksimume 2500 delegitoj. Oni deziris havi sur la programo ion pri la internacia lingvo, kaj petis la ŝtatan esperantistan asocion ke ĝi helpu pri tio. Tial la ŝtata esperantista asocio elektis la jenajn parolantojn: Sro. C. J. Roberts, el Omaha, Konsilanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko, kiu paroladis pri “Esperanto de la Vidpunkto de Komercistoj;” kaj Pastro Chas. P. Lang, el Blair, sekretario de la ŝtata asocio, kies temo estis “La Monda Lingvo kaj Monda Evangelismo.” Dimanĉon oni aŭskultis esperantan Diservon, kondukitan de Pastroj C. P. Lang kaj J. R. Bennett, helpataj de aliaj esperantistoj. Aldone, la asocio aranĝis “instituton,” por klarigi pri la internacia lingvo, disdoni propagandilojn, kaj vendi lernolibrojn, k. t. p., dum la tuta daŭro de la kunveno.

La kunveno okazis tro malfrue por ebligi al AMERIKA ESPERANTISTO ricevi plenan raporton por enpresado, tamen ŝajnas ke la esperantista parto de tiu grava kunveno estis kontentiga sukceso, kaj multe progresigis “Nian Aferon.”

## Oraj Divenaĵoj

(Ĉiu responda vorto finiĝas per “oro.”)

Kio multajn homon altiras? *Oro.*

Kio la tagon antaŭiras? *Aŭroro.*

Kion ofte famuloj akiras? *Gloro.*

Kio estas de l'tago nur peco? *Horo.*

Kio necesas al feliĉeco? *Laboro.*

Kiu titol' estas multuzata? *Sinjoro.*

Kio estas tre zorge gardata? *Trezoro.*

Kion vi en ĝardeno vidas? *Floro.*

Kiu konsilas, avertas kaj gvidas?

*Mentoro.*

Kio la sangon tra l'korpo fluigas?

*Koro.*

Kio maŝinojn ĉiuspecajn movigas?

*Motoro.*

Kiu instruas en supra lernejo? *Profesoro.*

*fesoro.*

Kiu ludadas sur la scenejo? *Aktoro.*

Kio estas pentraĵo vorta? *Metaforo.*

Kio infana armilo forta? *Ploro.*

Kiu okupas sin je legado? *Lektoro.*

Kiu ofte je parolado? *Oratoro.*

Kio facile sin eklumigas? *Fosforo.*

Estanton kaj estinton kunigas? *Memorero.*

Kio la homan nazon regas? *Odoro.*

Iufoje el la ĉielo falas? *Meteoro.*

Kio estas dikfela besto? *Kastoro.*

Kio de l'dormomastrino la pesto? *Pulvoro.*

Kio estas birdego fluganta? *Kondoro.*

Kio estas ago plaĉanta? *Favoro.*

El kio estas statu' konstruata? *Marmoro.*

De kiu la vesto estas farata? *Tajloro.*

Kio en sudaj akvaroj troviĝas? *Aliĝatoro.*

Kio el alkoholo fariĝas? *Likvoro.*

Kio anoncas la vizitantojn? *Sonoro.*

Kio ĉiam plaĉas amantojn? *Adoro.*

CELIA DOERNER.

## For the Beginner

*Is "ambaŭ" ever an adjective? Does it not seem to qualify the noun in the sentence "ambaŭ personoj venis?"*

The sentence proposed shows a correct adjectival use of "ambaŭ," which, like many other pronouns, also serves as a pronominal adjective, modifying a noun as above. The only important point to be noted in regard to "ambaŭ" is that it is *not* an adverb. This must be noted because its English translation "both," like many other English words, belongs to more than one grammatical category, although it is not quite so elastic as "well" (which is noun, adjective, verb and adverb), and other similar examples. So, while the pronoun "both" is to be translated by the pronoun "ambaŭ," the adverbial "both" in the collocation *both . . . and . . .* must be rendered (as in French, Latin, etc.) by repetition of the conjunction (See Kellerman, Complete Grammar 26; Cox, Commentaries 264, 268, p. 330). When we remember that conjunctions were originally adverbs, whose force extended gradually to the whole phrase or clause, we realize how logical this use of "kaj" is. (On "ambaŭ" see also Kellerman 236, Cox 248 and p. 230. The examples given by Cox are rightly selected, although his classification is wrong.) Some illustrations of the contrasting use of this and of "ambaŭ" are:

Kaj li kaj ŝi venis. Ambaŭ atendas vin.  
*Both he and she came. Both will wait for you.*

Mi helpas kaj lin kaj ŝin, sed mi ne amas ambaŭ el ili. *I will help both him and her, but I do not love both of them.*

Ambaŭ infanoj povas kaj legi kaj skribi.  
*Both children can both read and write.*

Ili ambaŭ estas tre amindaj, they both are very lovable (the pronoun ambaŭ used in apposition with the personal pronoun preceding it.)

La knabo kaj lia fratino estas ambaŭ diligentaj, the boy and his sister are

both diligent (the pronoun ambaŭ used in apposition with the two nouns together).

*How should we translate "by" in such an expression as "a rectangle 8x10 (eight by ten) inches?"*

The following three methods may be used:

Ortangulo dek (10) colojn longa, ok (8) colojn larĝa.

Ortangulo 8 colojn je 10 coloj.

Ortangulo 8x10 coloj.

*Since "de" sometimes means "from" and sometimes "by," how would you render the sentence "La domo estis aĉetita de li?"*

This sentence is ambiguous without a context to show what the speaker intended. Presumably he meant "Li aĉetis la domon," or else "Iu aĉetis de li lian domon." If for some reason a passive verb must be used, or ambiguous order retained, the meaning may be rendered clear by use of "al." This care is necessary because by a wise provision of the author of Esperanto the meanings "of, from, by," etc.,—which run variously into each other in various national tongues, and are so closely allied in certain differing ways that entire separation would cause bewilderment,—are scientifically divided just enough to permit each race to master the use of the Esperanto with a minimum of effort and a maximum result of accuracy and clearness in expression.

La suno estas kaŝata al ni de nuboj, the sun is hidden to (from) us by clouds.

La mono estas perdita de mi, the money has been lost by me (i. e., I did the losing).

La mono estas perdita al mi, the money has been lost to me (has gone from my possession).

La monujo estis ŝtelita al mi de li, the purse was stolen from me by him (I was deprived of it by him).



SILENTA PARTOPRENANTO.

Itala markizo invitis la gesinjorojn de la ĉirkaŭaĵo al granda festeno, kaj tial provizis ĉiujn frandaĵojn de la sezono. Kelkaj el la gastoj jam estis alvenintaj por saluti lian moŝton, kiam la kelisto rapideme eniris la ĉambron.

"Via Moŝto," li diris, "jen staras mal-supre plej mirinda fiŝkaptisto kiu estas alportinta unu el la plej belaj fiŝoj, mi kredas, en Italujo, sed li petas tian prezon por ĝi!"

"Ne estas grava, lia prezo," ekkriis la markizo, "pagu ĝin tuj!"

"Mi farus tion, Via Moŝto, sed li rifuzas akcepti monon."

"Kion do la homo deziras?"

"Cent batojn per vergo sur siaj nudaj ŝultroj, Via Moŝto; li diris ke li ne rabatos eĉ unu baton."

